1-a Jaro, N.ro 20 APERAS SEMAJNE 12. Februaro 1925

ESPERANTO · je la servo S.A.T. de la tutmonda PROLETARO

SENNACIULO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

La abonprezaro kaj reklamtarifo troviĝas sur la lasta paĝo — Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. — Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia organo, kaj se oni sendas al la Red. du ekz. de la gazeto enhavanta la koncernan represaĵon. — Ponumera prezo: 0,05 dol.

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

La perspektivoj

De *K. R.*

La imperialista milito de 1914—18 estis nur daŭrigo de la imperialista politiko dum la pasintaj dudek jaroj. Kun neimagebla rapideco la milito esprimis la jam pli frue rimarkeblajn disvolviĝ-tendencojn. Kun speciala forteco ĝi akrigis la en la kapitalismo ekzistantajn antagonismojn kaj tielmaniere kreis novajn fort-rilatojn. Ses jaroj da imperialista paco ankoraŭ pliprofundigis la sulkojn, kiujn la milito gravuris sur la vizaĝon de la tero. La kvar ŝanĝoj de la milito kaŭzitaj, postulas de ĉiu marksano detalan pritakson, ĉar ili estas la bazo de la plua evoluo de la mondrevolucio, komenciĝinta de la mondmilito.

I. Transgrupiĝoj en la tendaro de la kapitalistaj regnoj.

La malkovro de Ameriko transportis la centron de la homara divolviĝo de la Mediteraneo al la Atlantika oceano. Jam en jaro 1851 skribis Marks en la observo en la "Nova Rejna Gazeto", ke la malkovro de la orminejoj en Kalifornio transŝovas la centron de la mondevoluo al la havenoj de l'Pacifiko. Ne atentante tamen je la tuta revolucio okazinta depost kiam Japanio enpaŝis la vicon de la kapitalistaj regnoj, depost kiam Anglio per pafilegoj detruis la muregon de la ĉina izoliteco, depost kiam la agrara Ameriko fariĝis lando de fabrik-kamentuboj kaj "nubgratantoj" — restis tamen Eŭropo la centro de la mastruma disvolviĝo, la elirpunkto por la movaj fortoj de la tuta mondo. La angla kaj germana kapitalismoj estis la koro pelinta la sangon en ĉiujn vejnojn de la kapitalista mondo. La milito tion finis. La mastruma malfortiĝo de Eŭropo, la neimagebla rapidega industria disvolviĝo de Usono, ĝia legenda riĉiĝo je la kostoj de l'tuta mondo — ĉio tio pretigis la finon de l'eŭropa hegemonio. Nur socialista revolucio, kiu unuigus tutan Eŭropon kaj kunigus en unu organismon ĝiajn nemezureblajn produktadfortojn kaj la kristalizajn teknikajn spertojn de la laboristaro nur ĉi-tio estus povinta savi Eŭropon de disputriĝo aŭ de rolo de usona kolonio.

Pro ĉi-tiu fakto cedas en malantaŭon ĉiuj aliaj transgrupiĝoj okazintaj en la kapitalista mondo. Se la kapitalista Eŭropo estas gvidata de Francio, kiu sin apogas sur la feron kaj karbon de Brie-baseno kaj Ruhrteritorio, aŭ se al Anglio prosperos krei en Eŭropo novan epokon de tiel nomata "ekvilibro" t. e. de incitado unu kapitalistan regnon kontraŭ la alia — ĝi nur difinos la disfaloformojn de l'kapitalista Eŭropo, la formojn de batalado inter la kapitalistaj regnoj de l'malnova kontinento.

En ambaŭ okazoj la Unuigitaj Ŝtatoj efektivigos la politikon de l'amerika mondo, la politikon de incitado unu eŭropan kapitalistan regnon kontraŭ la alia. Tion sentas la malmiopaj reprezentantoj de la regantaj klasoj kaj deziregas pro tio en tiu aŭ alia formo unuigi la kapitalistan Eŭropon. Sed la unuiĝo maleblas sur kapitalista fundo, ĉar kapitalismo signifas konkurenco. Kaj kunigu la Ligo de Nacioj ĉiujn kapitalistajn regnojn, Usonon inter ili — estos ĝi ne io alia ol batalkampo por la reciprokaj interesoj de la naciaj kapitalistaj grupoj. Ĉiu el ili klopodos sin asekuri per la subteno de Usono en la batalo kun la kontraŭuloj.

Sed la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko estas potenco, kiu kuŝas ne nur geografie apud du oceanoj — la Atlantika kaj la Pacifika — ili estas ankaŭ ekonomie devigataj peni por stari firme kun la piedoj sur la azia kaj eŭropa kontinentoj. Al tio ilin pelas la industria disvolviĝo de okcidenta Ameriko kaj la vekiĝo de Ĉinio. Kiam generalo Gordon en jaro 1859 enmarŝis Pekinon, kiam en jaro 1900 ekspedicio de reprezentantoj de l'tuta kapitalista mondo sufokis la "boxer"-leviĝon, la kapitalismo akiris en Ĉinio nur la haven-teritorion. En daŭro de la lastaj dudek jaroj la kapitalista disvolviĝo enpenetris mezon de Ĉinio. 400 milionoj da homoj troviĝas en proceso de revekiĝo. La proksimaj tridek jaroj respondos la demandon, ĉu ili mem administros sian landon posedanta nemezureblajn provizojn da karbo, fero, krudoleo kaj produktanta tiom da rizo per kiu tuta Azio povas esti nutrata — aŭ ĉi-proceso okazos sub la egido de usona kapitalo.

La Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko prepariĝas al la rolo ne nur de diktatoroj de Eŭropo, sed ankaŭ de diktatoroj de Orienta Azio. Kion Marks antaŭvidis en jaro 1851, ke la disvolviĝ-centro transportiĝas de l'Atlantika oceano al la Pacifika, fariĝos nun fakto. (Finota)

El "Arbeter Welt", organo de "Poalej-lijon" en Polio, esp. igis Jak (227.)

La historio entute, la historio de revolucioj speciale, estas ĉiam pli riĉenhava, multflankeca, vivoplena, "ruza", ol supozas la plej bonaj partioj, la plej konsciaj avangardoj de l'plej progresintaj klasoj. Tio ja estas komprenebla. Ĉar la plej bonaj avangardoj esprimas la konscion, la volon, la pasion, la fantazion de dekmiloj; sed la Revolucio realigas en la momentoj de aparta emancipiĝo kaj la streĉo de ĉiuj homaj kapablecoj la konscion, la volon, la pasion, la fantazion de kelkdekmilionoj, kiuj estas ekscitegataj de l'plej akra klasbatalo. El tio rezultas du gravaj praktikaj konkludoj: unue, ke la revolucia klaso devas kompreni por plenumo de sia tasko, regi ĉiujn formojn aŭ flankojn de l'socia agado, sen la plej malgranda escepto, (je kio ĝi post la konkiro de l'potenco politika, ofte kun granda risko kaj ekstrema danĝero tion efektivigas, kion ĝi ne faris antaŭ tiu ĉi konkiro); due, ke la revolucia klaso devas esti preta por plej rapida kaj neatendita alterno de l'unu formo per la alia.

N. Lenin.

Je kiom oni malaltigis salajron de la laboristoj en jaro 1923

Jam kelke da fojoj menciis laborista gazetaro je kia grado kunhelpis laboristoj, por malaltigi la prezojn de la diversaj produktoj. Centra asocio de industriistoj (en Ĉekoslovakio — Red.) en sia raporto por jaro 1923 pruvas per siaj ciferoj, kiajn oferojn donis laboristaro por haltigi ondon de la multekosteco, kaj estus saĝe, se kompetentuloj[1]) streĉus ĉiujn fortojn, por ke la samo okazu en la alia flanko. Dume laboristo luldormigita per sugestio pri sia devo rilate al la socio permesis senrezone malaltigon de sia vivnivelo, hienoj kapitalistaj festas senhontajn orgiojn de la spekulacio kaj amasigas la riĉaĵojn.

Kiajn grandajn cedojn faris laboristaro, pri tio servu sekvanta komparo.

En sukerprodukta industrio oni malaltigis salajron, kaj tio kiel dum kampanio sukera, tiel eĉ inter la kampanio, je 25 proc. En ligna industrio oni malaltigis salajrojn proporcie al jaro 1922 je 20 ĝis 25 proc. En fabrikoj de fleksitaj mebloj oni malaltigis salajrojn je 30 proc., en fabrikoj de bareloj je 25 proc. Konstrulignaĵa industrio je 15 ĝis 20 proc. En kemia industrio estis malaltigitaj la salajroj je 25 ĝls 30 proc. En betona kaj keramika industrio je 25 proc. kaj en laboroj akordaj je 30 proc. En cementfabrikoj oni malaltigis la salajrojn je 6 ĝis 8 proc. Oni malaltigis aldonpagojn por vestoj kaj familio je 50 proc. kaj neniigis eldonadon de la liberkvota karbo. Ĝenerala malaltigo de la salajroj en cementfabrikoj proporcie al jaro 1921 estas 35 ĝis 45 proc. En vitra industrio oni malaltigis la salajrojn je 20 proc. En vestaĵ-iudustrio je 10 proc. Industriistoj el Liberec malaltigis la salajrojn je 30 proc., kaj al oficistoj rifuzis entute kromaldonon por vesto kaj malaltigis aldonon multekostecan je 10 proc. En biera industrio oni malaltigis la salajrojn proporcie al jaro 1922, kaj en septembro 1923 oni efektivigis denove malaltigon de la salajroj, tiel ke ĝenerala malaltigo de la salajroj estas 20,5 ĝis 26 proc. En industrio tanaĵa kaj muelila je 20 proc. En papera industrio krom tio, ke oni jam en jaro 1922 malaltigis la salajrojn je 15 ĝis 20 proc., oni reduktis denove salajron je pluaj 10 ĝis 15 proc., tiel ke ĝenerala malaltigo estas 25 ĝis 35 proc. Industrio de vivnecesaĵoj malaltigis salajron je 20 proc. Prahaj bakejoj malaltigis salajron je 10 ĝis 15 proc. En industrio mina kaj fera oni malaltigis salajron de la sklavoj de ĉiorega kapitalismo je 30 ĝis 45 proc.

Kien malaperis do ĉiuj promesoj de registaro, ke ni tiam venkos malfacilan multekostecon, kiam laboristoj lasos malaltigi siajn jam malgrandajn salajrojn? —

Promesoj, por malsaĝulo la ĝojo.

El pola minlaborista "Gazeta Górnicza" (prononcu Gurniĉa) eliranta en Ĉekoslovakio trad. Jozefo Sedzimir (pron. Senĝimir).

Analizo de Angla Komerco (lastjara)

Resumo el raporto
de Departamento de Komerco (Board of Trade).

La karbo elfosita el la minejoj estis 1913 — 287 miliontunoj, 1923 — 276 kaj 1924 — 269. Do, produktado falis je 6,4 proc., kaj la eksporto de produktaĵoj falis je grado de 19,4 proc. La plej granda procento de falo rilatas eksporton al Germanio, Nederlando, Belgio, Francio kaj Italio: Anglio 1923 elsendis al ili 54,5 milion-tunojn, kaj 1924 nur 34 m. t. Fero kaj ŝtalo estis eksportitaj 1913 — 1242 m. t., sed 1923—24 nur 1059 m. t. El tiu ĉi produkto, maŝinaro pleje suferis: dum 1913 eksportitaj estis 172 tunoj, sed nur 106 dum 1924.

La importo de kotono falis de 429 m. tunoj 1913 ĝis 312 m. t. dum 1923—24.

La senlaboruloj kiuj riecevis ŝtatsubvencion, nombris 1319000 en decembro 1924. Dum la tuta jaro la cifero neniam estis malpli ol unu miliono: dum la plej favora monato, junio, estis 1049000 senlaboruloj.

Tamen la Brita Departamento de Komerco raportas, ke tiu ĉi granda nombro montras ke la kondiĉoj estas iom pli bonaj ol dum la antaŭaj jaroj. Estis senlaboraj dum 1921 — 16 proc., 1922 — 14 proc., 1923 — 11,6 proc. kaj dum 1924 — 10,5 proc.

Ni devas konsideri, ke multaj senlaboruloj ne ricevas iun ajn subvencion, ĉar kiam ili prezentas sin ĉe la respondeca oficisto, tiu ĉi havas la rajton rifuzi lin, ĉar "li ne vere serĉas sufiĉe arde novan laboron". Pro tio pli ol 17000 senlaboruloj estis forstrekitaj el la registro dum 6 monatoj: La malfeliĉa malriĉulo havas nenian povon por kontraŭstari tiun maljustan decidon.

Eĉ se la laboristo havas sufiĉe da bonŝanco por daŭre ricevi la asekuran monon dum la tuta periodo de 26 semajnoj, kaj ankoraŭ restas senlabora, li tiam trovas ekĉesigata sian malgrandan enspezon kaj tiam malsategas. En momento kiam li havas la plej grandan bezonon por subteno, li trovas ke li rajtas ricevi eĉ ne malgrandan monsumon, — li ricevas nenion.

Same okazas ĉe malsan-asekuro. Ju pli longe oni estas malsana, des malpli oni enspezas. Kun 10 proc. da senlaboruloj Anglio fariĝas malprogresa lando.

SAT-ano 3398 (Londono).

La faŝismo en Bulgario

La reakcio ne ĉesas subpremi nian malfeliĉan popolon kiel ĝi ne ĉesas en Hispanio, Estonio, Hungario, Italio ktp. Ĉu ni ĝin priskribu? — En la karceroj oni senindulge ĝismorte batas kaj poste la viktimon liberigas, senkulpigante sin: "Okazis pro eraro!" La policanaro, la defendo de l' "kara patrio" (pli vere de ties plenplenaj kasoj — plenaj pro la malsato kaj malfeliĉo de tuta popolo) en Sofia volis kapti kiel birdoj iujn anarkistojn. Sed ili estas bravaj homoj, ne estas tiel facila la afero. "Kion ni faru?" — ili demandas sin unu la alian, kaj bruligas la domon. Poste en la cindro oni trovas du kadavrojn bruligitajn. Junuloj kantas en la kamparo la kanton "Volga, Volga". Du ĉasistoj (komprenеble burĝoj — "sgovoristoj") ilin aŭdas kaj rimarkigas al ili ke ili ĉesu kanti ĉi tiun abomenan revolucian kanton (ĉio revolucia por ili estas abomena!). La junuloj ne ĉesas kanti, sed pli forte daŭrigas. Tiam venas por helpo la ĝendarmoj kaj unu detektivo (ankaŭ junulo ĵus fininta grimnazion, ftizulo), kaj la junuloj estas arestitaj. Ĉe ili oni trovas "Laboristan Gazeton" (nelegala komunista gazeto), ili estas batitaj ĝismorte kaj estas kondamnotaj laŭ la leĝo "por la defendo de l'ŝtato" (de la riĉuloj). En la montaro vagadas nelegalaj revoluciaj bandoj, la pano plikariĝas ĉiutage, sed la kasoj plipleniĝas ĉiumomente. Unu ĝojiga fakto — la laboristaro ĝis nun vigletis, sed nun ĉie — en fabrikoj, laborejoj, entreprenoj jam libere, pli libere ol antaŭe oni diskutadas kaj organizas sin por decida lukto. La proletaro nia ankoraŭ ne komprenas la signifon de nia lingvo, oni ĝin konsideras kiel malhelpilo por la organizo, ĉar nun atendas pli grava organiza laboro, kaj nur la liberaj burĝemuloj ĝin lernu. Sed estas multaj kiuj ĝin konsideras kiel gravega helpilo por la klasbatalo, ĉar nia celo — la tutmonda sovet-respubliko ne estas ebla sen ĝi, ĝi estas necesa ilo por la interkompreno de l'tutmonda proletaro. Tion bone komprenas la burĝaro, nia registaro, ĉefe ministro de internaj aferoj, la monstro Iv. Rusev, sed la proletaro ĝin ne konceptas. Kiam ni fondos nian respublikon kiel Rusio, tiam ni ĉiuj ĝin lernos, respondas ili, — sed ĝis tiam ni dormos, ni sopiros. — Nu, malgraŭ ĉio ni prosperas, kaj baldaŭ finfine ni venkos por feliĉo de ĉiuj.

Mallaboremulo

---

1) Kiaj kompetentuloj? — Red.

Pri kio instruis nin Kropotkin

(Al la kvara datreveno de la morto de Kr.: 8. II. 1921 – 8. II. 1925)

Oni ofte konsideras anarkismon kiel utopion, ne havantan bazon sciencan, nek radikojn sociajn, kiel individuisman filozofian utopion. Estante prava rilate al la abstrakta filozofia anarkismo individuisma, tia opinio tute malpravas rilate al la moderna anarkismo komunisma, kiu estas revolucia sistemo, aperinta en la dua parto de l' XIX a jarcento, en la epoko de la disfloro de l' kapitalismo kaj aktiviĝo de l' klase-organizita proletaro. La modernan anarkismon naskis la revolucia proletaro (la sekcioj de l' Ia Internacio, poste — la laborista sindikatisma movado). Ĝin formulis, kiel sciencan teorion, pluraj aktivuloj el la revolucia laborista movado, kaj inter ĉi-lastaj certe la unua loko apartenas al la neforgesebla P. A. Kropotkin.

Mi tute ne volas diri, ke Kropotkin estis prava en ĉiuj siaj paroloj kaj verkoj; certe, ni povas trovi ĉe li plurajn nekonsekvencaĵojn, pri kiuj ni ne povas, ne volas kaj ne devas konsenti. Nulo estas akceptenda senkritike. Sed ni ja ne povas en ĵurnalartikolo doni fundamentan, detalan kritikanalizon de l' "Kropotkinismo" en ĝia tuta amplekso. Tial mi volas nur noti kelkajn gravajn pensojn de P. A., kiujn devas bone memori ne nur ĉiu anarkisto, sed ankaŭ ĉiu klaskonscia laboristo ĝenerale.

1. La sociaj radikoj de anarkismo

„Dum ĉiuj epokoj en la hom-socioj renkontis sin batale du malamikaj fluoj. Unuflanke — la popolo, popolmasoj estis ellaborantaj, kiel kutimon, multon da instituoj, necesaj por ebligi la vivon en socio." "Aliflanke — ĉiam ekzistis homoj, kiuj estis grupiĝantaj kaj subtenantaj unu la aliun por regi la popolon, ĝin obeigi, administri — kaj laborigi ĝin por ili."

"Samkiel socialismo ĝenerale, anarkismo naskiĝis en la popolo, kaj tial ĝi konservos sian vivkapablon kaj kreivan forton nur ĝis kiam ĝi restos popola." "Neniam anarkio estis idealo de l'regantaj klasoj. Sed ofte ĝi estis pli-malpli konsciata *idealo de l' masoj.*"

„La laborista movado, kiu ebligas la kuniĝon de la batalfortoj de l' laboristoj kaj forigas ilin de senfruktaj politikaj interpartiaj konfliktoj, kiu permesas al ili mezuri siajn fortojn per rimedo pli certa ol elektoj, — tiu-ĉi movado grave akcelas la progresadon de l' anarki-komunisma doktrino."

2. La sciencaj bazoj de anarkismo

"Anarkismo estas mondkoncepto, bazita sur *mekanisma* kompreno de fenomenoj[1]), ampleksanta la tutan naturon, inkluzive la vivo de homsocioj. Ĝia esplormetodo estas metodo de l' natursciencoj; per ĉi-metodo estas kontrolenda ĉiu scienca tezo. Ĝia tendenco estas — fondi sintezan filozofion, t. e. filozofion, ampleksantan ĉiujn fenomenojn de l' naturo, — inkluzive la vivo de l' homsocioj kaj ties ekonomiaj, politikaj kaj moralaj problemoj."

„La mekanikaj fenomenoj, — estiĝante ĉiam pli kaj pli kompleksaj proporcie kun la transiro de fiziko al vivo-fenomenoj, sed restante ĉiam la samaj mekanikaj fenomenoj, — sufiĉas por interpreti (klarigi) la tutan naturon kaj la vivon organikan, intelektan kaj socian". "Ĉiuj sciencaj malkovroj estis faritaj per la sole-scienca indukta metodo. Kaj ĉar la homo estas parto de l' naturo kaj ĝia individua kaj socia vivo estas naturfenomenoj, samkiel la kresko de floro aŭ disvolviĝo de l' socivivo ĉe formikoj kaj abeloj, — tial malestas motivo por forlasi, transirante de floro al homo aŭ de loĝejaro de kastoroj al homa urbo, la metodon, kiu ĝis nun tiel bone servis al ni, kaj serĉi alian en la arsenalo de metafiziko".

---

[1]) Pli bone — aldonas Kropotkin – estus diri *kinematika*, ĉar per ĉi-lasta estas esprimata la *konstanta movado* de l' materio.

3. Anarkio, kiel historie-necesa sociordo

"Anarkismo prezentas per si provon apliki la ĝeneraligojn, akiritajn per la indukta-dedukta metodo de l' natursciencoj, al la analizo de homaj instituoj. Ĝi estas ankaŭ provo diveni, sin bazante sur ĉi-analizo, laŭ kiuj vojoj la homaro iros al libero, egalo kaj frateco, por akiri maksimuman sumon da feliĉo por ĉiu unuo en la homsocio."

"Erare estus diri, ke l' anarkisma sociidealo estas *utopia*. Ĉiu idealo prezentas aspiron al io ankoraŭ *nerealigita*, dume la vorto "utopio" en la komuna lingvo signifas ion *nerealigeblan* . . . Estas tute erare apliki la vorton "utopio" al prognozoj (antaŭvidoj), kiuj, simile al anarkio, estas bazitaj *sur studo de l' tendencoj jam rimarkataj en la socio en ĝia nuna evolustato.* Ĉi-tie ni eliras ekster la regiono de utopiaj revoj kaj eniras la regionon de pozitiva scienco — de scienca antaŭvido."

4. Individuismo kaj komunismo

"La individuisma direkto en la anarkismo prezentas per si postvivaĵon de delonge pasintaj tempoj, kiam la produktiloj ankoraŭ ne atingis tiun gradon de perfektesto, sur kiun metas ilin la moderna scienco kaj la progresoj de l' tekniko, kaj kiam, pro l' nesufiĉo de la tuta produktaĵaro, oni vidis en la komunisma socio neeviteblan mizeron kaj sklaviĝon de ĉiuj."

"La "konfirmiĝo de l' individuo" estas metafizika kaj malproksima de la reala vivo, . . . ĝi ofendas la senton de egalo, la fundamenton de ĉia emancipo, ĉar *estas neebla liberiĝi, dezirante regi aliujn;* . . . ĝi proksimigas tiujn, kiuj nomas sin "individuistoj", al la privilegihava malplimulto: al la pastraro, al la burĝaro, al la funkciuloj k. a., kiuj ankaŭ opinias sin starantaj super la maso kaj al kiuj ni ŝuldas la ŝtaton, la eklezion, la leĝojn, la policon, la militarismon kaj ĉiuspecan dumjarcentan premadon."

"*Individuado,* t. e. plejeble plena disvolviĝo de l' individueco tute ne konsistas el tio, ke la sociemo kaj la instinktoj de interhelpo estu forigataj el la kreiva agado de l'homo kaj ke estu restigata nur mallarĝa kaj sensenca burĝeca individuismo. Nur malsaĝuloj povas konsili forgesi la socion kaj revi pri izola individuo. Sed homo pensanta komprenos, ke male, ĝuste *la sociemo kaj la socieca kreivo*, kiam ili trovos liberan eliron ebligos al la homo atingi sian plenan disvolviĝon kaj supreniri la altojn, al kiuj ĝis nun sukcesis supriĝi nur solaj geniuloj en kelkiuj el siaj belegaj verkoj."

"La individuismaj sistemoj de anarkismo trovas adeptojn en la burĝa intelektularo, sed ili ne disvastiĝas en la laboristaj masoj. Tio certe ne malhelpas al ni rekoni la valoron de l' kritiko, kiun la anarkistoj-individuistoj direktas kontraŭ la komunistoj: ili avertas nin pri forlogiĝo al kuncentriga potenco kaj al burokrateco kaj igas nin ĉiam turni nian penson al la libera individueco, kiel fonto por libera socio. Kiel ni scias, la emo al malnovaj eraroj de subordigo kaj potenco estas tro disvastiĝinta eĉ inter avangardaj revoluciuloj".

5. Anarkismo kontraŭ ŝtatismo.

"Estas erare vidi en la ŝtato ion alian ol hierarkia organizaĵo de funkciuloj, elektitaj aŭ nomitaj por administri diversajn fakojn de l' socia vivo kaj por akordigi ilian agadon . . . estas erare pensi, ke sufiĉas ŝanĝi la personojn por igi la maŝinon funkcii en kia ajn direkto."

"Por liberiĝi de l' ekspluato, kiun ili suferas sub la zorgado de l' ŝtato, la popolmasoj ne povas resti sub la regado de politikaj formoj, kiuj malhelpas la manifestiĝon kaj disvolviĝon de l' popola iniciato. Ĉi-formoj estis ellaboritaj de registaro por eternigi la popolan sklaveston, — por *malhelpi la disvolviĝon de ĝia kreiva forto* kaj la kreiĝon de instituoj por egaliga interhelpo. Kaj tial estas trovendaj novaj formoj por servi al kontraŭaj celoj."

La ŝtata mekanismo, evoluante, celis kreadi kaj firmigi privilegiojn — kiel do ĝi povos servi por neniigi ilin? Ĉu tia nova agado ne postulos novajn ekzekutivajn organojn?

Kaj ĉu tiuj-ĉi ekzekutivaj organoj ne devas esti kreitaj nun de la laboristoj mem, interne de *iliaj* sindikatoj, de *iliaj* federaĵoj, sen kia ajn rilato al la ŝtato?"

„Ti-kiam falos la privilegioj por kelkiuj personoj kaj klasoj, kiuj estis kreitaj kaj subtenataj de la ŝtato, la ekzisto de l'ŝtato perdos ĉian pravigon. Tute *novaj* sociformoj devas aperi, kiam la interhomaj rilatoj ĉesos esti rilatoj inter ekspluatatoj kaj ekspluatantoj."

6. La socia revolucio kaj niaj taskoj.

"Ni ne evitos novajn provojn pri revolucia registaro dum la venonta revolucio." "La sola rimedo por paralizi la malutilan influon estas — preni mem la agad-iniciaton kaj direkti ĝin en pli bonan flankon."

"La burĝaro estas potenca ne nur pro tio, ke ĝi posedas riĉaĵojn, sed *precipe pro tio, ke ĝi uzis la libertempon, kiun donis al ĝi la riĉaĵoj, por ellerni la administro-arton kaj por ellabori sciencon, kiu servas por pravigi l' aŭtoritaton.*" "Ĝi scias, kion ĝi volas, ĝi scias, kio estas necesa por ke ĝia sociidealo estu konservata; kaj ĝis kiam la laborulo *ne scios,* kion li bezonas kaj kiel tion atingi, li estos devigata resti sklavo de tiu, kiu *scias.*"

"Ne droniĝante en detaloj, la burĝoj fiksis delonge antaŭ la revolucio la ĉeflinion de l'futuro. Ĉu ni povas diri la samon pri l'laboruloj? Bedaŭrinde, ne. En la tuta moderna socialismo, kaj precipe en ĝia modera parto, ni vidas klaran tendencon ne profundigi la principojn de l'socio triumfenda per la revolucio... Rilate al anarkistoj — la timo ekvidi sin dividitaj pro l'problemo pri l'futura socio kaj paralizitaj en sia revolucia ekmovo — efikas je ili samsence. Oni ordinare preferas ĉe la laboruloj prokrasti ĉiujn diskutojn, kiujn oni (tute malprave) nomas teoriaj, kaj oni forgesas, ke eble post kelkaj jaroj ili (la laboruloj) devos eldiri sian opinion pri ĉiuj problemoj de socia organizo, komence de la funkciado de bakfornoj ĝis la funkciado de lernejoj aŭ defendo de l'teritorio, kaj tiam ili ne havos antaŭ si la ekzemplojn de l'angla revolucio, per kiu estis inspirataj la Gironde-anoj de l'pasinta jarcento."

"Estas necesa preparlaboro. Estas necese, ke la novaj ideoj, kiuj markos novan originon en la historio de l'civilizo, estu projektitaj antaŭ, ĝis la revolucio; ke ili estu intense disvastigataj en la masoj por esti kritikataj de praktikuloj kaj por esti en certa grado eksperimente taksataj."

"La tasko, kiu kuŝas antaŭ la popolo dum la venonta ribelo, estas — ekposedi tiun funkcion, kiun ĝi lasis ĝis nun al la burĝaro. Ĝi konsistas el tio ke necesas *kreadi,* — organizadi neniigante kaj konstruadi por detrui. Jam venis tempo por, antaŭvidante ĉi rekonstruon, kuniĝi por havi la eblon senprokraste eklabori: studi *la erarojn* de l' pasintaj revolucioj samkiel iliajn bonajn flankojn; analizi, kion ili faris por garantii panon por ĉiuj, la produktadon de ĉiuj riĉaĵoj kaj interŝanĝon de l'produktaĵoj, kaj precipe — garantii ĉies egalrajton, sen kiu ne povas ekzisti justo, nek frateco. Fine, kamaradece serĉadi rimedojn por eviti ĉi-erarojn aŭ almenaŭ malpliigi ilin laŭeble".

7. Ĉu anarkismo pravas?

"Ĉu pravas anarkismo en siaj konkludoj? Tion montros al ni, unuflanke, la scienca kritiko de ĝiaj fundamentoj, aliflanke — la praktika vivo. Sed ekzistas unu punkto, en kies rilato anarkismo ekster ĉia dubo estas absolute prava. Ĝi estas tio, ke ĝi rigardas la studadon pri sociinstituoj, kiel fakon de l'natursciencoj; ke ĝi forlasis por ĉiam la metafizikon kaj alprenis kiel pensad-metodon la metodon, kiu servis por la kreo de l'moderna scienco kaj de l'materialisma filozofio de nia epoko. Pro tio, se l'anarkistoj faros en siaj konkludoj iujn erarojn, — ili multe pli facile povos rekoni ĉi-erarojn. Sed ti-kiuj deziras kontroli niajn konkludojn, devas memori, ke tio estas ebla nur per la scienca, indukta-dedukta metodo, sur kiu bazas sin ĉiu scienco kaj per kiu disvolviĝas la tuta scienca mondkoncepto". — *1334* —

Al ĉiuj revoluciaj esperantistoj tutmondaj!

Por Sacco kaj Vanzetti.

Malgraŭ la energia protesto, en la jaro 1921, Sacco kaj Vanzetti estas ankoraŭ en la manoj de la ekzekutisto.

Agu por ke ili estu baldaŭ liberigitaj.

Ti-kiuj interesiĝas pri Sacco-Vanzetti kaj kiuj volas subteni ilin morale, bonvolu sendi poŝtkarton al tiu adreso:

Sacco-Vanzetti,
Defense Committee
P. O. Box 93.
Hanover Street
Station (United S. of America) Boston,
Mass.

Tio helpos ankaŭ al la komitato kiu zorgas por la neapliko de tiu terura sufero: La elektra seĝo.




Nicola Sacco

Nicola Sacco estas 32jara. Li naskiĝis en Torremaggiore (Foggia). Li estas de post dekkvin jaroj en Ameriko. Li ĉiam laboris regule kaj li fariĝis unu inter la plej lertaj ŝulaboristoj. Li gajnis altan salajron. Dum la milito, li forlasis la laboron por ne aĉeti "liberty bond" kies posedo estis sugestita al ĉiuj fabrikaj laboristoj. Sacco rifuzis dirante: "Mi ne kredas al la milito kaj mi permesas al neniu kontroli kiel mi devas elspezi mian salajron".

Entuziasma liberecano, li okupiĝis dum siaj liberaj horoj pri la zorgoj pri sia familio kaj la poridea propagando. Al konsiloj pri prudento en siaj paroloj li respondis: "Mi ne povas, estas mia koro kiu parolas."

Li kulturis ĝardenon inter la laborhoroj kaj distribuis al la malriĉaj la legomojn al li ne bezonajn.

Li postulas laboron en malliberejo: "Mi ne povas vivi sen labori" diras tiu "stranga bandito".



Bartolomeo Vanzetti

Bartolomeo Vanzetti estas nuntempe 36jara. Li naskiĝis en Villafaletto, monta vilaĝeto en la provinco de Cuneo (Piemont.) Tute juna, li alvenis Amerikon. Li vojaĝis de lando al lando por trovi laboron, kaj fine li fiksiĝis en Plymouth (Mass), kie li loĝis de post kelkaj jaroj kiam oni arestis lin.

En unu el siaj leteroj, Vanzetti skribas: "Mi predikis, mi laboris, mi deziris kun ĉiuj miaj eblecoj ke la socia riĉeco estu je la dispono de ĉiuj homoj ĉar ili estas la frukto de la laboro de ĉiuj." "Mi estas filo de la naturo, mi estas tiel riĉa ke mi bezonas nenian monon, kaj oni diras ke por havi monon mi mortigis kaj riskis la mortpunon! La Morto? Estas nenio, la ofendo estas pli kruela".

El "Le Libertaire" Paris. Esperantigis J. M. 659.

Por nia meminstruado

5] Nova ciklo pri Sovetio

Laboristfakultatoj

Certe kamaradoj konas la politikon de Soveta registaro kaj kompartio rilate la proletariigon de superaj lernejoj (Vuzoj) por havi specialistojn el propra proletaria rondo, per kies helpo fariĝos efektivigebla la socialista mastrumado. Ĉiu supera lernejo (universitatoj, institutoj medicinaj, komercaj, agrikulturaj) havas konformajn "labfakojn", kien laboristoj kaj kamparanoj estas delegataj ĉu de sindikatoj, ĉu de komitatoj de malriĉaj kamparanoj. La Labfakoj preparas siajn anojn en konforma supera lernejo dum 3 jaroj.

La loko ne permesas halti pli detale je giganta laboro de tiuj laborfakultatanoj, je superhoma energio, per kiu ili batalas kontraŭ malfacilaĵoj, mizera materiala situacio, malkutimo al mensa laboro. Ili, kiel figure esprimis Lenin, efektive "mordetas per siaj akraj dentoj la graniton de scienco", kaj escepte malmultaj, bonege sukcesas. Iam la historio notos tiujn nerimarkatajn heroojn, kiuj en senmezure malfacilaj cirkonstancoj post laciga laboro apud la stablo venas superan lernejon por akiri la necesajn sciojn. Malfacile estas por ili teni en siaj maldelikataj, laciĝintaj manoj la krajonon, ankoraŭ pli malfacile memorfiksi la abstraktajn teoriojn, sed kiu povas imagi ilian obstinecon kaj persiston? Certe nur tiu, kiu almenaŭ unufojon ĉeestis tiun laboristan aŭditorion, vidis, kiel ili aŭskultas kaj kiel ili laboras!

Nur en Kievo nun estas 1250 labfakultatanoj.

Koncerne la superajn lernejojn, do ili ankaŭ jam estas je 70% proletariigitaj. La plej granda parto de proletstudentaro estas stipendiuloj ĉu regnaj, ĉu sindikataj, ĉu trustaj (la plej feliĉaj). Krom tio speciala komitato ekzistas por plibonigado de studentaj vivkondiĉoj (Kubuĉ). Helpata de sociaj organizaĵoj, trustoj, sindikatoj, ĝi disvolvis grandan laboron: organizis komunloĝejon kaj manĝejon, klubon, student-kooperativon, diversajn metiejojn, kie en libera de studado tempo studentoj plenumas diversajn mendojn aŭ preparas varojn, pri kies vendo zorgas la komitato. Certe, tre mizera estas ankoraŭ la situacio de proletstudentaro, sed ĝi ĉiutage pliboniĝas, kaj sendube multe kuraĝigas ilin ne nur materiala sed ankaŭ la morala subteno kaj simpatio, kiun ili trovas en ĉiuj rondoj de Soveta Socio. Kiu dubas, ke la estonto estas ilia?

Lernejoj

Koncerne la klerigan problemon ĝenerale, eble la skeptikuloj asertos, ke ĝi malprogresis eĉ kompare kun cara epoko, ke la klerigbuĝeto nun konsistigas nur 1/3 de antaŭmilita, ke la kvanto de lernejoj malgrandiĝis, ke malnovaj lernejoj estas detruitaj, kaj novaj forestas ktp. ktp.

Eble formale ili estas pravaj, sed fakte la bildo estas iom alia. Estas vero, ke lernejo en Sovetlando, kiel multaj aliaj sferoj, travivas teruran krizon. Sed ĉu minaca estas tiu krizo, aŭ ĝi portas resaniĝon kaj vivon? Ke malnova lernejo estas ĝisfundamente detruita, neniu neas, kaj verŝajne ankaŭ neniu bedaŭras, kiu almenaŭ iomete ĝin konis. La nova efektive ne ankoraŭ estas kreita, ĉar antaŭ ol krei novajn lernejojn, estas necese havigi novajn pedagogojn, kapablajn apliki la novajn metodojn enkondukendajn. Kaj efektive oni nun reinstruas la pedagogojn, oni praktikigas ilin en la novaj sistemoj de instruado: Kompleksa metodo, Daltona sistemo, seminara laboro ktp. Dume la lernejo suferas, sed iom post iom la nova lernejo kaj nova metodo ekfunkcias kaj fikse stariĝas sur reloj de novaj sociaj postuloj.

Bedaŭrinde ni havas dume nek universalan, nek senpagan instruadon, kvankam ĝi estas tia por infanoj de senlaboruloj, invalidoj, ruĝarmeanoj, kaj preskaŭ senpaga (20 kop. monate) por ĉiuj sindikatmembroj.

Sendube la pliboniĝanta ekonomia situacio solvos ankaŭ tiun problemon. *Ida Lisiĉnik, Kiev.*

Sovetio en ciferoj

Bona rezervo por la mondrevolucio!

La organizaĵoj de "junaj leninistoj" (infan-grupoj komunistaj) nombras je la fino de 1924 750 000 geinfanojn!

Ĉi-organizaĵaro, unuiganta infanojn, loĝantajn de Siberio ĝis la kaŭkaza montaro kaj de l'Murman-marbordo ĝis la mezaziaj oazoj kaj dezertoj, estas la plej potenca infan-asocio de l'mondo. Se mi indikos ke ĝi fondiĝis en 1922, ĉiu eblos fari konkludojn sen pluaj komentoj.

Da kluboj en Ukrainio

laboristaj, partianaj, studentaj k. cet. funkcias dum aŭtun-vintra klubsezono 1924—1925 jam 1120!

Cifereto enviinda por laboristaro el multaj landoj!

Da gazetoj en Sovetio

aperas 583 kun entuta eldonkvanto: 6 255 980. — El tiu kvanto 4 500 000 apartenas al ĉiutagaj. — La moskva "Pravda" aperas en pli ol duon-miliona eldonkvanto.

Entute, la poligrafia industrio troviĝas en pli bona stato, ol ĉiuj aliaj. Da gazetoj aperas pli, ol ĝismilite.

En 11 lingvoj!!!

Super la eniro de l'marista klubo en Odessa (Nigra maro) pendas *11-lingva* indiktabelo: "Prol. el ĉiuj landoj, unuiĝu!... Internacia marista port-klubo ktp...."Maristoj bezonas klubojn kaj klerigadon sed ĉu ili havos tiajn, se necesos "kleriĝi" en 11 lingvoj minimume?

— Ni konsilus al la Ruĝa Intern. Propagand-Komitato de l'transportlaboristoj kune kun la Amsterdam'a simpatianta Esp.on, Federacio Transportista trovi plej bonan kulturigilon.

Ĉu ĝi ne estas Esp.o?

Grandioza "Festrimedo"

Pro la jarreveno de l'morto de N. LENIN, la ŝtata Eldonejo Rusia decidis eldoni 250 broŝurojn kaj librojn, dediĉitajn al la memoro de Lenin, lia vivo, agado kaj lia verko: leninismo. Por la laboro estas invititaj ĉ. 40 aŭtoroj. La broŝuroj estas presataj en kvanto de 40 000 ĝis 200 000 ekz., ĉiu. — Entute aperos 25 000 000 ekzempleroj. *Dneprano.*

Io pri "sanktaj" aferoj kaj "sanktula" konduto

Nova skandalo ĉe la rusa nigra eklezio (monakaro) eksplodis!

En subteraĵoj de l'grandmonakejo "Troica" (Trieco) en Kiev estas trovitaj multaj grandvaloraĵoj, *kaŝitaj dum la malsat-tempo 1921* por ke ili ne estu uzitaj por la helpo al malsatuloj (kia bona ekzemplo de kristana frateca amo al la proksimulo!).

En ĉi-sankta loko oni trovis kelkdek kilogr. da oro, pli ol 160 kgr. da arĝento, 360 briliantojn, sakojn da malnova arĝentmono ktp. Entute — je la valoro de ĉ. 800 000 rubl. (pli ol 400 000 dolaroj!).

Krome oni trovis... riĉan spion-dokumentaron, forsendendan al eksterlando.

La "sanktajn" aferojn gvidas la monakejestraro. *Dneprano.*

TRA LA KLASBATALO

En Hamburg okazas proceso ampleksa kontraŭ komunistoj akuzitaj esti la iniciatintoj de l'Hamburga oktobra ribelo en 1923. — Ĉe la Ŝtata Tribunalo en Leipzig komenciĝos procesego kontraŭ membroj de la komunista centralo germana 10. februaro.

Okazis minlaborista soveta konferenco en Halle, kie estis reprezentitaj la 65 plej grandaj minlaborejoj de Meza Germanio. Oni konsiliĝis pri batalrimedoj por efektivigi plialtigon de salajroj kaj laborhorajn postulojn.

Kontraŭ prof. Albert Einstein estas farita atenco en Berlin de iu tie loĝanta rusino, kiu ne efektiviĝis. La sama jam provis atencon kontraŭ Krasin, soveta ambasadoro en Paris.

Grekio protestas kontraŭ la turka registaro pro ekziliĝo de l'ĉefo de la ortodoksa eklezio.

DIVERSAĴOJ

Nuna Moskvo

(Kelka statistiko)

La loĝantaro de Moskvo dum la lastaj jaroj antaŭ la revolucio estis kreskanta pli rapide, ol en ĉiuj aliaj grandurboj de la tuta mondo kaj ĵus antaŭ la februara revolucio 1917 ĝi superis du milionojn da loĝantoj.

De post 1921 la loĝantaro de Moskvo ree komencis kreski kun eksterordinara rapideco kaj laŭ la kalkulo 15. julio 1924 en Moskvo estis jam 1 772 mil loĝantoj.

En proksima tempo la kvanto da moskvanoj ree atingos 2 milionojn.

En Moskva gubernio, sen urbo Moskvo, la kvanto da loĝantoj en 1924 superis 2250 mil homojn — do, kune kun la urbo pli ol 4 milionojn.

La Moskva loĝantaro antaŭe estis kreskanta pro alfluo de venanta elemento el aliaj lokoj de la lando, ĉefe al apudaj gubernioj. Sed nun la loĝantaro pli rapide kreskas pro tio, ke en la gubernio oni pli multe naskiĝas, ol mortas.

Nun en Moskvo la mortado estas malpli multa, ol en Londono, Parizo, Budapeŝto kaj Varsovio. Precipe malpli multa fariĝis mortado de mamsuĉantaj infanoj. Dum la lastaj du jaroj el ĉiu milo da novnaskitoj en la unua vivjaro mortas nur 160 ĝis 180, sed antaŭ la milito estis mortantaj 268—280. Antaŭ la milito en Moskva gubernio (sen la urbo) ĉiujare el 10 mil loĝantoj mortis 301 homoj, en 1922 — jam nur 213 kaj en 1923 — 172 homoj.

Egale kun malplimultiĝo de mortado post la revolucio montriĝas eksterordinara kresko de kvanto da novaj geedziĝoj. En la pasinta 1924 jaro la proporcio de geedziĝoj estis 15 por ĉiu milo da loĝantoj, t. e. 2 1/2-oble pli multe, ol antaŭ la milito.

(El "Izvestija" — 21. jan. 1925.)

KRONIKO

Sovetio.

Moskvo. En la aranĝita ĉe Centra Moskva Telefona Stacio funebra vespero (22. I. 25) okaze de la unua jara datreveno de Lenin-morto, niaj k.doj Revo, Robiĉek kaj Mateev faris siajn paroladojn en esperanto. Aliaj oratoroj atentigis pri la granda valoro de esp.o en la internacia laborista movado. Krome ĉiu ĉeestinto (pli ol 500) ricevis donace esp.-lingvan biografion de Lenin.

Rubcovo, Moskva gubernio. En la enarbara lernejo "Iskra" (Fajrero) funkcias kurso de Esperanto por junaj pioniroj — kamparanoj (14 geinfanoj en la aĝo de 10 ĝis 12 jaroj). Gvidas k.do Ŝuŝerin. Aliaj du pli multenombraj grupoj komencas kurson 27. I. sub gvido de k.do Savĉin.

Belaja Glina (Kaŭkazo). Post raporto de k.do Bokarev A. ĉe la ĝenerala kunveno de lernantoj de 2-agrada lernejo, fondiĝis rondeto por lerni esp.on.

Fastov, Kieva gubernio. Ĉe loka Laborista Klubo organiziĝis esperantista grupo el 20 k.doj. Funkcias kursoj por 15 k.doj el Komunista Junularo, gvidas k.do Petrovskij.

Moskvo. En Termezurista Instituto 15. XII. 24 estis organizita de k.do Trojanskij propaganda esp.a vespero (150 ĉeest.). Raporton pri esp.o faris k.do Drezen.

El letero de k.do Nathans

"Havas la impreson, ke la internacia lingvo dum la lasta tempo faras bonegajn progresojn, juĝante laŭ la kreskanta nombro de fak- kaj aliaj gazetoj (krome la Radio!), kiuj okupiĝas pri Esperanto. El nia rondo nun la gazeto de la svedaj fervojistaj oficistoj (Chefs de gare, Employés de Bureau etc.) publikigis parton de nia opinio pri Esperanto kaj malfermis skriban kurson.

Kaj mia kolego Edo Fimmen, ĝis nun tre indiferenta je Esperanto, deklaris antaŭ kelkaj semajnoj en unu el la multnombraj paroladoj kiun ni havis pri Esperanto, ke li, konvinkita ke almenaŭ en specialaj cirkonstancoj la scio de Esperanto povus esti utila, klopodus trovi tempon por lerni la lingvon. Estas laŭ mia opinio simptomo de la progreso."

La blekado de l' brutaroj kaj de l' popoloj preskaŭ ĉiam aklamas la buĉistojn kaj la tranĉilakrigistojn. Han Ryner.

Gelaborista korespondado

Ni ricevis jenan leteron:

Traleginte la artikolon de k.do N. B. en n.ro 12 de "Senn." pri "stranga popoleto" de SAT-anaro, mi ne povas min deteni por ne senkulpigi min. Kaj povas esti ankaŭ multaj troviĝantaj en la sama situacio. Oni vidu, ke kelkfoje malaktiveco devenas ne el nedeziro labori, sed el nepovo.

Mi estas maŝinistino. Nia laboro estas tre peniga, tre laciga. Veninte hejmen el oficejo, jam sufiĉe laca, mi trovas tie knabeton, al kiu mi fordonas jam tutan reston de l'tago, de l'fortoj. Post lia enlitiĝo al mi restas nur tempo por tralegi unu-du gazetojn kaj memkompreneble "Sennaciulo"n kun S. R. Semajne mi havas nur unu tagon liberan — dimanĉon, kaj tiun ĉi tagon mi dediĉas al esperanto. Ni iras al nia seguzino de l'lignaĵistoj, kie mi havas grupeton el 7 gelaboristoj. Ĉiam min renkontas la "Internacionalo" (esperantlingve) kaj sepvoĉa ĥoro salutas "bonan tagon". Niaj okupoj daŭras 2—3 horojn kaj konsistas precipe el tralegoj de eltiraĵoj el "Sennaciulo", kaj iom-post-ioma prepariĝo al "ensataniĝo". Certe, baldaŭ ni havos sep bravajn fervorajn SAT-anojn! Bedaŭrinde ni havas nur la malnovan gramatikon de Saĥarov kun ekzemploj, kiel "oficiro arestis soldaton", "Al inĝeniero apartenas la maŝino" kaj "sur la ŝtuparo staras policano". Mi dezirus jam havi la gramatikon kun ekzemploj, kiel "soldatoj arestis oficiron" "La maŝino havas la inĝenieron" kaj "ŝtuparo estu senigita de l'policano". Ĉu bone, ĉu ne, sed mi donas al gelaboristoj aliajn ekzemplojn.

Adiaŭante mia grupeto denove ĥoras "Internacionalon" — "ĝis revido" kaj iafoje ... "grandan dankon" — kaj tio estas la unika ĝojo en mia monotona laborplena vivo. *N. K.*

Nova "Espero".

En la mondo blovas nova vento.
Tra la mondo iras forta voko.
En la kantoj de la ruĝa sento
nun de loko flugu ĝi al loko!

Vokas ĝi al glavo kaj milito
laboristojn nun de l'tuta tero!
Al proleta klaso turmentita
ĝi promesas pacon kaj liberon.

Sub standardo ruĝa de ribelo
kolektiĝas fortaj batalantoj,
kaj rapide iras al la celo
kun bataloj kaj kun ruĝaj kantoj.

Forte staris muroj de miljaroj
inter laboristoj dividitaj ...
Sed dissaltos la obstinaj baroj
per komuna lingvo disbatitaj.

Sur la forta klasa fundamento,
helpe de la lingvo Esperanto,
laboristoj faros en konsento
unu grandan rondon batalantan.

Niaj bravaj fortaj kamaradoj
en batalo sanga ne laciĝos,
ĝis la ĉenoj de la perfortado
por liber'eterna disrompiĝos.

Novigis S. Driagin.
(El mur-gazeto "Viatka Esperantisto")

Al Taŝkenta SAT-anaro

Ni ĉiuj SAT-anoj de Lublin kore dankas vin por kunsento, esprimita de vi en lasta (17) numero de Sennaciulo. Ankoraŭ unu fojon okazo montris al ni, ke Esperanto nepre devas esti disvastigita inter ni laboristoj por reciproka interkonatiĝo kaj komunaj interesoj kaj celoj.

Bedaŭrinde niaj kamaradoj ankoraŭ estas en mallibero kaj juĝo verŝajne okazos marte. Do ankoraŭ la saman tempon ili sidos.

Se iu el vi, karaj k.doj, deziros ricevi pli detalajn sciigojn, bonvolu vin turni al administracio de Sennaciulo, kie k.do Lerchner donos al vi mian adreson.

Kun kamarada saluto restas ĉiam via 2798.

Lublin, 23. 1. 25.

RECENZEJO

Libroj

Esperanta Biblioteko Internacia, N.o 7, *El Dramoj,* N.o 12, Lucius Apulejus, *Amoro kaj Psiĥe.* — Eldonejo: Ellersiek & Borel, Berlin k. Dresden, paĝoj 48 kaj 56, Formato 10×14, Prezo po 0,30 mk. —

Tiuj libretoj, — la unua prezentas al ni fragmentojn el la famaj dramtradukoj de D.ro Zamenhof, la dua legindan rakonton verkitan de antikva-roma aŭtoro, tradukitan el latina lingvo, — estas noveldono de samforme jam antaŭ la milito aperintaj broŝuroj. Jam en tiu tempo oni ŝatis la libretojn pro ilia malkareco kaj plaĉa prezento. Tio validas ankoraŭ hodiaŭ, kaj la lingve puraj kaj senriproĉaj du verketoj do povas esti rekomendataj al ĉiuj. *N. B.*

Gazetoj

Represis artikolojn: *Le Libertaire,* Paris, 20. 1., Sufiĉe da militado (S. R. aŭg./sept.); *Le Droit du Peuple,* Lausanne, 19. 1., El Mongolio (S. 15); *Väst-Svenska Kuriren,* Göteborg, 24. 1., Ĉina popolo k. Sovet-R. (S. 15). *Le Cri des Jeunes,* St. Etienne, jan., Mongolio (SR. 52), Laborkonfl. en Svedio (S. 4), Komerco kun R. (S. 7).

Enpresis div. artikolojn: L'Ecole Emancipée, Saumur, 25. 1. (kdo. Ivanov-Odessa pri ped.); Les Humbles, Paris, nov. 24 (pri E. Toller laŭ SR. kun portreto); Les Gaziers de Paris, 15. 1. (deklaracio de Nathans); Le Mutilé, Paris, jan. (alvoko); Väst-Svenska Kuriren, Göteborg, 24. 1. (Intern. korespondado); Le Cri des Jeunes, St. Etienne, jan. (alvoko).

Al miaj interkorespondantoj!

Pardonu la prokraston de miaj respondoj! Pro la cenzuro al mi estas malpermesata skribi en aliaj lingvoj, krom litova. Sed al mi estos enmanigata ĉiuj al mi adresataj leteroj, tutegale en kiuj lingvoj estas skribitaj. Kore mi petas la korespondantojn: daŭrigu la interkorespondadon! Ĉiu kamaradeca letero estas lumradio en mia malhela ĉelo!

Mia nova adreso nun estas: S. Oželis-Kazlauskas, Panevėžys (Litovio), Sunkiųjų Darbų Kalėjimas (punlabora malliberejo).

KORESPONDEJO

3612. Via verstraduko ne estas tute sukcesinta. Se oni kapablas traduki prozan tekston, tio ne signifas jam ke oni venkas la poeziajn malfacilaĵojn. Eble vi elektos ion pli simplan. Ĉi tiun ni ne povas enpresi. *N. B.*

1081. Se ne tro multekostaj, ni uzos viajn tabelojn por S. Ni preferus kurantan tekston sen tro da ciferoj pri sama temo. *N. B.*

3684. Via sendaĵo bone alvenis. Ni transsendos. *N. B.*

3637. Dankon pro via sendaĵo. La de vi projektitaj temoj (sendotaj) ja *pli* taŭgas, *ĉiuj* por S. ol la momente senditaj pri ideaj temoj. *N. B.*

"Satano 39". Certe ni konsentas pagprokraston. *Adm.*

... *Ĉie oni vidas la samon: amasiĝon de konfliktoj, kreskon de ekonomia kaoso, plenan malsimplecon de internaciaj rilatoj kaj sur la horizonto — fantomon de nova monstra grandoza milito. Ĉar nur unu sola "progresiva" evolulinio, progresiva en citosignoj, estis dum tiu ĉi postmilita periodo en la sferoj de l' burĝa administrado — tiuj ĉi eksterordinaraj novaj militinventaĵoj, militŝipoj direkteblaj sen homo, kiam oni povas flugigi aeroplanon sen homo, estos eble ĝin direkti sidante en kabineto, kaj ĝi deĵetos la bombojn kiam necesas; grandega milita aerŝiparo en Ameriko, kolosaj kanonoj en Francio, kiuj povas bombardi angliajn bordojn kaj la samaj kanonoj en Anglio, kiuj povas bombardi franciajn bordojn, kaj aliaj similaj elmontroj de homa genio en ĉi fako. La "progreso" evidenta. Kaj de tie ĉi ankaŭ klaras, se ni scias, ke la amasiĝo de konfliktoj estas senevita (kaj tion rekonas la liberalaj profesoroj), do tiu perspektivo kiu estas metata antaŭ la homaro, estas la plej terura perspektivo, ĝi estas tio, ke la burĝaro povas — kaj ĝi tion faros, se ne malhelpos tion la laborista klaso,* — dispafi la restaĵojn de sia propra civilizo per perfektigitaj detruo-iloj, kiuj estas elpensitaj dum tiu ĉi postmilita paca periodo.

N. Buĥarin *(Proleta revolucio kaj kulturo, pĝ. 11–12)*

Ne forgesu vian SAT-anan devon:

varbadi ĉiam kaj ĉie por via asocio kaj ĝiaj organoj.

Fragmentoj el "Dek jarojn en Persio"

19) *E. Rebrik*

Persa laboristo estas kapabla, laborema, sed seniniciativa, male bona kopiisto. En sia profesio ĉia persa laboristo estas inerta, rutinema, kion oni povas klarigi kiel manko de profesia klereco kaj superstiĉemo, kies radiko sin trovas en religio.

Nomadoj sufiĉe multnombraj en Persio okupiĝas precipe de brutedukado kaj tapiŝproduktado. Multaj el nomadgentoj maltrankviligas ĉiame persregistaron per siaj invadoj, atakoj je komerckaravanoj kaj je oficistoj de registaro. Tiaj estas gentoj de bahtiari, luri, turkmenoj, kurdoj kaj aliaj. Registaro fortuzas kaj penegas trankviligi, pacigi kaj humiligi ilin, sed je tio malmulte sukcesas. Nuntempa militveziro kaj preskaŭ militdiktatoro de Persio Riza-ĥano daŭrigas tiun ĉi aferon kun pli granda sukceso.

Celante laŭeble sendanĝerigi sin je flanko de tiuj ĉi gentoj, registaro agas tiel, kiel oni ĉiam faras en feŭdala lando. Registaro invitas gentestrojn en ĉefurbon, donas al ili altajn postenojn kaj oficojn kaj tiel tenas ilin kvazaŭ garantiuloj respondaj pri agoj de sia gento. Tiu ĉi sistemo ankaŭ ne ĉiam celatingas, ĉar gentestroj konstante intrigas kaj eĉ pretendas ŝahtronon.

Urba loĝantaro plejparte konsistas el komercistoj de ĉiuj rangoj, oficistoj kaj laboristoj. Oni povas diri preskaŭ senerare, ke 80—90% de urbloĝantaro okupiĝas pri komerco, komencante de kolportistoj de alumetoj, cigaredoj, fruktoj k. a. ĝis grandaj komercistoj. Kaj inter ili laboras alia granda armeo de komisiistoj, sen kiuj oni ne kontraktas komercaktojn.

Dum vilaĝanaro portas sur si sufiĉe multepezajn impostojn kaj tributojn por regno ĉu mone ĉu naturprodukte, urba loĝantaro kaj precipe komercistaro preskaŭ tute evitas fiskon. Ekzistas neniaj impostoj por rajto komerci, nek komercpatentoj nek gildaj atestoj. Entute komercistaro sin trovas en ege privilegiaj kondiĉoj kaj estas tre honorata.

Oficistaro je sia meza nivelo distingiĝas je malalta klereco kaj burokratismemo. Inter oficistoj sin trovas multe da aligentuloj: armenoj, ĥaldeoj k. a., kiuj staras sur pli alta nivelo de klereco. Laboron de oficisto oni pagas mizere kaj dank' al tio, ke distinga eco de persa regna kaso estas ĉiama malpleneco, do oficistoj, — iafoje okazas, — ne ricevas sian salajron dum duonjaro kaj pli. Strikoj de oficistoj eĉ en ĉefaj regnaj oficejoj (vezirejoj) estas tre oftaj.

Sekvantan ŝtupon de persa socio okupas gildo de pastraro, pri kiu mi jam sufiĉe parolis en ĉapitro "Religio", kaj poste iras agrarularo. Agrarularo estas vera mastro de irana tero kaj en ties manoj sin trovas ankaŭ politika potenco. Cetere tiu ĉi potenco havas tutajn trajtojn de feŭdala sistemo, kaj ofte grandbienulo estas samtempe guberniestro de tiu distrikto, kies plej granda parto de teroj apartenas al li mem. El nombro de bienuloj kaj agraruloj formiĝas estraro de ĉefaj regno-oficejoj.

Regnestro de Irano estas Ŝaho, kies potenco estas limigita de konstitucio, kiun persa popolo ricevis post revolucio de 1907. Cetere potenco de nuna Ŝaho Ahmed estas tute nominala, spritulo eĉ parolas ke lia ĉefurbo estas parizaj kafejoj, ne Teheran, ĉar li ĉiam "gastas" en Parizo. Vera do estro kaj preskaŭ diktatoro estas milita veziro Riza-Ĥano. Leĝdonanta ĉambro estas parlamento — medĵlis. Sed aliflanke gravan rolon ludas ankaŭ pastraro, ĉar religio ĝis nun estas fundamento kaj fonto de juro, kaj tutaj juraj rilatoj fondiĝas sur religia leĝaro "ŝariat".

El vidpunkto de religo Ŝaho estas uzurpulo de potenco, el vidpunkto de estroj de nomadgentoj kaj grandaj bienuloj (ĥanoj) nuna dinastio el turka gento de Kadĵar, kaptinta potencon en sia tempo per forto, estas ankaŭ uzurpulo; cetera popolo rilatis ĉiam kaj rilatas nun al ĉia potenco, aŭ nacia aŭ fremdlanda, tute indiferente, jam dum multaj centjaroj kaŝante sian nacian vizaĝon.

Fino

Lingvaj respondoj al demandoj de apuddneprano

(Sekvo)

5) *Sufero, doloro, malĝojo* estas terminoj ofte misuzataj, samkiel en la franca lingvo; ĉu oni ne povus determini ĉiun el ili por ke ili ne estu miksigitaj?

— La konfuzon kaŭzas la naturo de la aferoj, ne la vortoj, ĉar la vortoj anstataŭas kaj simbolas ideojn kaj, ĉar la ideoj estas esence varieblaj, nefiksaj kaj etendeblaj, la signifo de iliaj simboloj ne povas esti absolute fiksa kaj rigida. Erara estas la opinio, ke oni povas fiksi tiel firme kaj absolute la signifon de la vorto, ke neniam estu eble uzi tiun vorton anstataŭ alia vorto. Male, plej ofte okazas, ke du aŭ tri vortojn oni povas en plej multaj okazoj sendiference uzi interŝanĝe; tamen ĉiu el tiuj vortoj havas ankaŭ apud la ĝenerala senco iun pli specialan nuancon, kiu estas propra al ĝi. Ekz.: *bati* kaj *frapi*, *kvieta* kaj *trankvila*, kiuj, krom en malmultaj apartaj okazoj, povas esti egale uzataj. *Sufer'* estas pli larĝsignifa ol *dolor'* kaj *malĝoj'*, ĝi egale signas korpan aŭ moralan malagrablan senton. *Dolor'* signas pli fortan malagrablan senton, prefere korpan (Bein'a Vortaro). *Malĝoj'* ankaŭ esprimas malagrablan senton, sed nur moralan, nekorpan.

6) Kiel forigi la tro oftan ripetadon de iu vorto (prepozicio, konjunkcio)? Ja renkontiĝas ekzemple tiaj frazoj: "La Repertuara Komitato *de* l'Artfako *de* ĉefpolitikklerigada Komitato *de* l'Popolkomisarejo *de* Klerigado *de* l'Ukrajna Respubliko.

— Vi embarasiĝas pro malfacilaĵoj, kiujn vi mem kreas. La frazo, kiun vi citas, povus esti ankoraŭ multe pli longa kaj pli trafa; ekz.: La nepo de la nevo de la bofrato de la patro de la prezidanto de la Repertuara Komitato de l'Artfako de ĉefpolitikklerigada komitato de l'Popolkomisarejo de klerigado de l'Ukrajna Respubliko.

Vi bonvolos konfesi, ke tiaj frazoj estas en la praktiko malofta kaj ke ili apartenas al la speciala kaj faka lingvo de la politiko. Tiaj teknikaĵoj ne bezonas atenti la belsonecon. Cetere, eĉ en la komuna uzado de lingvo, la vortoj devas respondi al la efektiva realaĵo: se la realaĵo enhavas ripetadon de sama ideo, la sama vorto laŭnature kaj laŭracie devas esti ripetata; se vi parolas pri ia tre malsimpla komitato, kiu estas subdividita en multaj fakoj kaj subkomitatoj kaj subfakoj, neeviteble la lingvo devas esprimi tiun ĉi maloftan dividitecon kaj eksterordinaran multecon de samaj rilatoj per ripetado de samaj vortoj. Fine estas facile variigi la prepozicion, anstataŭigante la vorton *de* per aliaj egale taŭgaj kaj eĉ pli precizaj prepozicioj; ekz.: La Repertuara (Sub) Komitato por l'Artfako en la ĉefpolitikklerigada Komitato de l'Popolkomisarejo por klerigado de l'Ukrajna Respubliko. Ni uzu la jam ekzistantajn en nia lingvo rimedojn antaŭ ol revi novajn; ni ne sopiru je flugiloj, forgesante, ke ni havas piedojn.

7) Ĉu *ad* signifas unutempe multfojecon kaj daŭrecon? Se jes, kiel oni povas distingi, ĉu temas pri la daŭreco de iu ago aŭ pri ĝia rea farado kelfoja?

Laŭ la fundamento *ad* signifas nur daŭrecon de la ago; sed, ĉar multfojeco postulas daŭran tempon por realiĝi, estas kompreneble, ke *ad* povas ankaŭ akcesore signi multfojecon. Tamen ĝia propra kaj ĉefa signifo estas la signifo pri daŭreco. La signifon pri multfojeco povas aldoni nur la kunteksto.

8) Kion signifas *beleta, ĝentileta, ĉarmeta?* ĉu *iomete bela* ktp.? Se ne, kiel oni povas tion distingi?

— *Zamenhof* mem diras en iu el siaj *lingvaj respondoj:* "La sufikso *eg* ne povas servi por simpla anstataŭado de la vortoj *granda* aŭ *tre*, sed ĝi devas servi por kreado de vortoj *novaj* kun senco *speciala*. Neĝusta uzado de la sufikso certe ne estas aprobinda kaj, kiom oni povas, oni devas ĝin eviti. Tamen esti tro severaj ni ankaŭ ne devas. En multaj okazoj, en kiuj ni povus bone uzi la vortojn *granda* aŭ *tre*, ni povas ankaŭ sen peko kontraŭ la spirito de Esperanto uzi la sufikson *eg*, ĉar tre ofte la saman ideon unu persono povas prezenti al si kiel ideon simplan en granda mezuro, dum alia persono ĝin prezentas al si kiel ideon specialan. Ekz., la vorton *bonega* ni preskaŭ ĉiam povus anstataŭigi, per *tre bona*, kaj tamen en la samaj okazoj oni ankaŭ povas prezenti al si bonecon *eksterordinaran* kaj uzi por ĝi vorton *apartan* tiel same, kiel oni faras preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Laŭ mia opinio ni devas esti tre singardaj nur en tiaj okazoj, en kiuj ni povus ricevi aŭ senduban eraron kontraŭ la lingvo aŭ tute malĝustan sencon; sed en ĉiuj aliaj okazoj tro granda severeco kaj katenado estas superflua. *En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?*"

La samo taŭgas pri *et* kiel pri *eg*, kaj *et* povas kelkfoje samsignifi, kiel *malgranda*, kvankam ĝi havas propre kaj preferinde alian sencon, kiun oni povas facile klarigi nur per ekzemploj pruntitaj el iu nacia lingvo: *bela*, beautiful, beau, schön, bello; *beleta*, pretty, joli, hübsch, vezzoso; *ridi*, to laugh, rire, lachen, ridere; *rideti*, to smile, sourire, lächeln, sorridere; *tuŝi*, to touch, toucher, berühren, toccare; *tuŝeti*, to graze, effleurer, streifen, sfiorare; *domo*, house, maison, Haus, casa; *dometo*, cot, cabane, Hütte, capanna; *tranĉilo*, knife, couteau, Messer, coltello; *tranĉileto*, penknife, canif, Federmesser, temperino; *plugilo*, plough, charrue, Pflug, aratro; *plugileto*, spade, bêche, Spaten, vanga; *ŝtuparo*, stairs, escalier, Treppe, scala; *ŝtupetaro*, ladder, èchelle, Leiter, scala a piuoli.

Mi ne parolis pri la senco de la vortoj "ĝentileta" kaj "ĉarmeta" pro tio, ke mi neniam renkontis ilin; ĝenerale ili povus, laŭ mia scio, nur samsignifi proksimume, kiel *iom ĝentila*, *iom ĉarma;* tamen eble ili povas, en kelkaj lingvoj, respondi al ia aparta vorto.

Mogo.

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla dulinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas **la devon, nepre** respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Argentino

K.do *Irenes Antonanzas*, Str. Gary, 2466, *Mar del Plata*, dez. koresp. pri anark. k. lab. movadoj, k. ĉ. l.

Bulgario

K.do *Samiel Sidi*, str. H. D. Asenov, 8, *Plovdiv*, L, PI, PM, k. vidaĵojn k. ĉ. l.

K.do *Bension Behar*, str. D.ro K. Stoilov, 31, *Plovdiv*, dez. koresp. L. interŝ. gaz. vidaĵojn k. ĉ. l.

Ĉinio

K.do *I. Seriŝev* sciigas sian amikaron, ke li forlasis Ĥarbinon kaj estas nun instruisto de Pekina-Esperanto-Kolegio, *Peking* Pekina Esperanto-Kolegio).

Francio

K.do *A. Immig*, Rue de la Ziegelau, 11, *Strasbourg-Neudorf*, pri ĉ. temoj, L, PI, bfl. k. ĉ. l.

Germanio

K.do *Ernst Schmidt*, *Eilenburg a. N.*, Augustenplatz 2, dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, PI, PM.

K.do *Otto Ziegner*, *Eilenburg a. N.*, Eckartstr. 11, muzikisto, dez. koresp. k. ĉ. l., L, PK, PI, PM.

K.do *K. Preu*, Fleischergasse, 7, *Annaberg i. Erzgeb.* dez. koresp. L, PM, PI, bfl. k. ĉ. l.

K.do *H. Kreusel*, Kl. R. W. Str. 25, *Annaberg i. Erzgeb.* dez. koresp. L, PI, bfl. k. ĉ. l.

"Deziras interŝanĝadon de PM, k. ĉ. l. Sendu unue." Adr.: *H. Wolfschmitt*, Klenzestr. 99, I. r., *München.*

Sovet-Unio

K.do *Maksimov Ivan*, *Minsk*, 1 dolgobrodskaja 54 loĝ. 1, kun laboristoj pri diversaj temoj k. ĉ. l.

K.do *Laagus Jaan*, komunikas sian novan adreson: Komissarovskaja str. 44, kv. 27 *Leningrad.*

12-a grupo de Ŝtataj Esperanto-Kursoj, Fundukleevskaja 32, kv. 23, *Kiev*, pri div. temoj kun ĉ. l.

K.dino *Tuljakova E. M.*, Prospekt K. Libkneĥta 63, lĝ. 15, *Leningrad*, dez. koresp. pri demandoj de sociala asekuro.

Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ ¼ jare abonebla.**

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG